



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 11-a de Junio 2018

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Dror Gaon, Matilda Landaŭ, Mikaelo Lineckij, Eldad Salzman, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi

Loko: en la aŭlo de WIZO, ne en hospitalo Iĥilov kiel en aprilo kaj majo (pro la kurso).
Montriĝis tute taŭga kaj pli konvena.

Protokolo de la antaŭa kunsido (14-a de Majo 2018) – publikigita en la retejo.

1. Raportoj (Amri)

- a). Aperos tutpaĝa artikolo pri la ekskursoj antaŭ/post la Israela Kongreso en la julia n-ro de Revuo Esperanto
- b) Nitsotsot: Eran (en Koĥav Jair) kaj Amri (en La Hebrea Gimnazio en Jerusalemo) finis la duan kurson de siaj lernejoj pri Nitsotsot.
- c) La Jerusalema grupo kunvenis la 30/5-an. Venonta kunveno: ĵaŭde, la 28/6-an de junio.

2. Respondo al la letero de la Registristo de Asocioj (רשם העמותות) - (Amri, Ŝlomo)

- a) Alvenis letero al ELI de רשם העמותות kun peto respondi ĝis la 28/6 al longa listo de demandoj kiuj koincidas kun la akuzoj de Jagil. La letero diras ke tio estas sekve de plendo ricevita.
- b) Ŝlomo verkis detalan respondon. Amri aldonis alineon pri Jagil, kaj detaligis multajn pliajn aktivecojn laŭ la listo de demandoj.
 - 1) Ni mencias en nia respondo, ke ni konas la plendinton.
 - 2) Ni aldonos ekzemplojn pri lia longjara insulta kaj kontraŭ-socia aktiveco.
 - 3) Responde la demandojn pri la kapitalo de ELI: ni estas asocio sen gajno.
 - 4) Ni devas emfazi, (kion ni NE faris en antaŭa korespondado kun la Registristo), ke la pli grandajn sumojn ni ricevis kiel heredaĵon, ne kiel rutinaj enspezoj.
 - 5) Niaj rutinaj enspezoj, kiel de kotizoj kaj lupago, estas balancitaj kontraŭ la elspezoj.
- c) Amri parolis kun adv. Ram Modan, kiu verkis pli koncizan version surbaze de la tuta materialo, sed konsilis, ke Ŝlomo, kaj NE advokato subskribu kaj sendu la respondon.
- ĉ) Eran kontaktis pri la sama temo kun adv. Morag. Laŭ li ni havas tri specojn da respondoj: 1. elstarajn; 2. bonajn; 3. problemajn. Li trarigardos ilin kaj konsilos.
- d) Amri: gravas memori ke ni ne disputas kun la Registristo aŭ kun kontistino Ŝar'abi (kiu subskribis la Registristan leteron). Ili ricevis plendon kaj simple plusendis la demandojn al ni. Ni respondu detale, pacience kaj afable, eĉ se al ni iuj demandoj aspektas stultaj.
- e) Ni devas raporti pri la tuto al la membroj, ne eblas prisilenti. Necesas sciigi la kialon (la plendletero de Jagil), kaj gian potencialan damaĝon, kaj ke ni provizis kompletajn respondojn, helpe de advokato. Estis konsentita ke Ŝlomo raportos pri tio en la Landa Kunveno, la 3/an de julio.

2/...



3. Landa kunveno (Jehoŝua, Matilda)

Jehoŝua rezervis la grandan salonon en WIZO por mardo, la 3/7-an. (ZOA montriĝis pli kosta). Programo: Mikaelo proponas komunan kantadon, en kelkaj partoj (10 min.). Prelego: Lea hebree aŭ en E-o, ankoraŭ nesciebla. Ankaŭ Eran – en E-o aŭ hebree laŭbezone. Arta programo: Ŝoŝja, Enrika, Amir, Tali. Ŝlomo: bezonas 5 minutojn por la buĝeto. Li povos paroli pri la problemo de la Registristo (10 min.). La Kontrol-Komisiono bezonos 5 minutojn.

4. Israela Esperantisto

- a) Amri disdonis al ĉ. 20 membroj en Akko, 5 en Jerusalemo, pliaj en la klubejo la 14-an de majo kaj hodiaŭ, entute ĉ. 50 ekzemplerojn (ankaŭ al la kursanoj).
- b) Jehoŝua ankoraŭ ne aktualigis la adresaron. Li esperas tion fari baldaŭ.
- c) Jehoŝua sendos al Dror kiu printos la etikedojn (p.s.: gravas aĉeti bonkvalitajn etikedojn kiuj bone gluas kaj ne falos).
- ĉ) Oni surgluu kaj enkovertigu dum la venonta okazo (la LK).
- d) Amri sendu la preparitajn kovertojn per rabatita amasa tarifo.
- e) Por la venonta n-ro (166, vintro 2018) eklaboras Mikaelo. Amri jam sendis al li la akumuligintan materialon.

5. Salutanto en Lisbono

Dror salutos. Proponita vortumo: "*Nome de la E-istoj en Israelo mi salutas la kongreson dezirante al ĝi plenan sukceson, kaj invitas al la venontjara 20-a Israela Kongreso, okazonta en aprilo 2019, kune kun la Mezorianta MONA-Kunveno en Eilat kaj Akaba*".

6. Retejo: protokoloj de 2016 kaj antaŭe (Dror) – ĵus farita [nur 2016].

7. Luado de la Dratwerejo (Amri, farita)

La luantoj en strato Ĥelmit 16 en Bat Jam foriros je la fino de junio, tiu ĉi monato. Estas urĝe luigi por ne perdi la lupagon por julio! Amri publikigos ĝin en Jad-2, provizore (ĝis la mezo de julio) kun la portebla telefono de Jehoŝua. La datumoj: 3 ĉambroj, 1-a etaĵo (ne tera, sur kolonoj), lupago 3000 NIS (negocebla, la nuna lupago estas 2800 NIS), balkono, sen klimatizilo, parkloko. En la kontrakto aperu mencio de la ebleco de rekonstruado, se ankoraŭ aktualas.

La venonta kunsido: 9-a de Julio 2018, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi